# SENNACIULO

OFICIALA ORGANO DE S.A.T.

http://www.satesperanto.org/ *** retadreso: satesperanto@free.fr

## MALANTAŬ BELA KIMONO, KIA REALECO ESTAS EN INDUSTRIO?

VIDU PAĜOJN DE "SAT-KULTURO"



" Juzen estas japana metiarto tre malnova kaj histoririĉa. La teknikoj priskribitaj en la lastaj paĝoj estas delikataj kaj kompleksaj. Ili necesigas koloran reprodukton. Vi ankaŭ trovos meze de tiu gazeto pli ampleksan tekston kiu respondos al ĉiuj viaj demandoj. Bonegan legadon!"

SAT-ANOJ KUTIMIĜU AL EKSTERNACIA SENT-, PENS-, KAJ AGADKAPABLO!   LANTI

Decembro 2006 77-a jaro, n-ro 12 (1218)
MENSUEL / MONATA
ISSN 1163.0442   Prezo: 5 €

9 771163 044279

# PAC-AGADO

## Pacista Frakcio de SAT

## « M 51 »

# Hodiaŭ : Malŝparado Morgaŭ : Danĝero

La 9-an de novembro 2006, franca armeo efektivigis la unuan pafon de misilo « M51 » . Tiu nova strategia



*Unua pafo de misilo « M 51 »*

misilo estis propulsita de la « Centro de provoj kaj de pafoj de misiloj » (CELM). Tiu centro situas en sudokcidento de Francio ĉe la bordo de Atlantika Oceano. Ĝia surfaco estas 15 000 hektaroj ; ĝi okupas 28 kilometrojn de marbordo ; estas malpermesite eniri en ĝi. Laŭ niaj informoj, la misilo pezus 51 tunojn, kaj havus trafdistancon ĉirkaŭ 10 000 kilometroj. La plej granda parto de la trajektorio de misilo efektiviĝas ekster la tera atmosfero. La misilo, kiu estis pafita de la franca Centro (CELM) falis apud la brazila marbordo. Dum la provoj la misiloj estas nearmataj (t.e. la misiloj ne entenas nukleajn kapojn). Tiuj misiloj « M 51 » armos, en 2010, la 4 francajn submarŝipojn-misilpafilojn. Ĉiu submarŝipo estos ekipata per 16 misiloj kaj ĉiu misilo entenos 6 nukleajn kapojn.

### Malŝparado

– Dum la operacoj la submarŝipoj eventuale povus elĵeti misilojn do, la Centro de provoj (CELM) konstruis, por la provoj, grandegan basenon profundan je 50 metroj. En tiu baseno estas aparato, kiu, kiel en la submarŝipoj, elĵetas la misilon ekster la akvon, antaŭ ol la motoroj de misilo ekfunkcias. Dum provo, la misilo evitu aviadilojn, satelitojn, … Do, provo postulas multajn antaŭzorgadojn. Ĝis 2010, franca armeo planis dekon de provoj de « M 51 ».

La kosto de studadoj, konstruoj de prototipoj, provoj, estas 5,7 miliardoj da Eŭroj. La produktado de « M 51 » kostos ĉirkaŭ 3 miliardojn da Eŭroj.

### Danĝero

– Respondeculoj de franca Oceana Strategia Atomarmilaro diskutas la eblecon eksplodigi nukleajn kapojn de misilo « M 51 » je la altitudo de 20 kilometroj. Laŭ ili, la eksplodoj je tiu altitudo malpliigus la radiadojn, kaj detruus la komunikojn. Franca armeo, kaj sendube aliaj armeoj, preparas « belajn tagojn » por homaro !



N° 271

SÉNAT

SECONDE SESSION ORDINAIRE DE 1992-1993

Rattaché pour ordre au procès-verbal de la séance du 15 avril 1993.
Enregistré à la Présidence du Sénat le 22 avril 1993.

PROPOSITION DE LOI

*relative au* désarmement unilatéral de la France,

PRÉSENTÉE

Par MM. Franck SÉRUSCLAT, Germain AUTHIÉ, Mme Maryse BERGÉ-LAVIGNE, MM. Jacques BIALSKI et Marc BŒUF,

Sénateurs.

(Renvoyée à la commission des Affaires étrangères, de la défense et des forces armées, sous réserve de la constitution éventuelle d'une commission spéciale dans les conditions prévues par le Règlement.)

*Leĝpropono n-ro 271*

### Ni reagu

– Jes ! Sed kiel ?
Ekde kelkaj jaroj, Francio ĉiujare elspezas ĉirkaŭ 3 miliardojn da Eŭroj por sia atomarmilaro. En 2007, la Francoj elektos Prezidanton de la Respubliko, tio estus okazo por elekti Prezidanton, kiu komencus malarmadi. Bedaŭrinde, ĝis nun, neniu kandidato proponas politikon de malarmado.


Ni opinias ke SAT-anoj komencu debati pri la temo. Ni rememorigas ke ni estas por « Unuflanka Malarmigo » de Francio. (Antaŭ kelkaj jaroj, 5 francaj socialistaj gesenatanoj metis, ĉe Senato, la Leĝproponon n-ro 271, kiu antaŭvidas progresivan malarmadon ĝis totala malarmado. Ni detale prezentis tiun Leĝproponon kaj ni proponis agojn en Sennaciulo n-ro 1177/1178 de julio-aŭgusto 2003 ).

Colette Weiss / André Weiss

## MONATO DE E-LIBRO

**http://www.satesperanto.org/-Librovendejo-.html**



# BONVENIGO AL LA NOVA REDAKTA SKIPO



Karaj,
venis momento ke post 24-jaroj de seninterrompa redaktado kaj produktado de 295 numeroj de nia organo Sennaciulo, mi transdonu la torĉon al la nova redakta skipo kiu estas preta daŭrigi mian laboron kaj produkti tute novan, freŝan, pli modernan kaj pli maldekstran gazeton. Ili certe povas daŭre kalkuli pri mia helpo kaj subteno.
Do, antaŭ 24 jaroj, en aprila numero de 1982 aperis la simila teksto en kiu mia kamarado kaj amiko, Norbert Barthelmess, transdonis al mi la redaktadon de Sennaciulo. Li daŭre restis redaktanto de Sennacieca Revuo (vidu la foton). En tiu tempo la kompostado kaj presado de Sennaciulo estis farata de la presisto en Rotterdamo. Pro la fakto ke mi ne parolas la nederlandan lingvon, rekta kontakto kun la presisto ne estis ebla. En tio helpis al mi nia forpasinta kamarado Quispel. La enpaĝiglaboro estis farata laŭ la klasika maniero per tranĉado, gluado kaj produktado de la maketo kiun poste la presisto mem realigis.

## *Bonvenigo al nova redaktoro*

*Post pli ol duonjarcenta prizorgado de nia SAT-organo ,,SENNACIULO'' mi trandsonas fide kaj ĝoje mian postenon al mia kara kolego kaj amiko, K-do Kreŝo Barkoviĉ, membro de P.K. de SAT. Mi estas certa, ke li plenumos la postulatan laboron konscience kaj kompetente; cetere mi plue restas disponebla por helpi la novulon, por ke li havu apogon ĝis plena spertiĝo. Krome mi restas la redaktoro de ''Sennacieca Revuo'' (jara kajero).*

*Tiuokaze mia voko iras al ĉiuj kunlaboremaj SAT-membroj, kiuj havas la kapablon verki ion interesan kaj konforman al nia spirito, ke ili sendu siajn artikolojn kaj komentojn senhezite al la redaktejo en la Avenuo Gambetta. Vi faciligos la redaktoran laboron, tajpante nur unuflanke de folio (tio validas ankaù por manuskriptoj), lasante blankan marĝenon por povi eventualajn korektojn, kaj kooperante por ke la nivelo de nia gazeto restu alta kun originaleco.*

*Kun freŝa kuraĝo antaŭen!*

N. Bartelmes

En la jaro 1988 SAT aĉetas sian unuan komputilon - Macintosh SE, kun malgranda ekrano kaj tiam ankoraŭ neebla uzo de E-literoj. Kun entuziasmo mi memlernis la uzon de tiu moderna ilo, de novaj programoj por prepari min al nova tasko enpaĝigi mem nian gazeton. Intertempe ni mendis ĉe iu entrepreno la fabrikadon de E-litertipoj. La enpaĝigo ne estis facila ĉar la ekrano estis malgranda kaj oni devis "navigi" sur la paĝo A4 por enpaĝigi parton post parto. La unua numero de la de mi mem enpaĝigita Sennaciulo aperis en januaro 1989 (vidu bildon). Evidente, ĝi estis ne tre bela kaj sukcesa, tiel ke la PK petis la membrojn pri toleremo kaj pacienco por ke la redaktoro havu tempon spertiĝi kaj plibonigi la kvaliton. Intertempe la komputiloj evoluis kaj ankaŭ la spertoj de la redaktoro. Ankaŭ ni ŝanĝis la presiston kiu nun troviĝis en Francio kaj kun kiu la kontaktoj estis pli facilaj.




La aspekto de nia gazeto kaj la preparmaniero ankaŭ evoluis. Aperis difinitaj rubrikoj kaj ankaŭ rubrikredaktoroj. En tiu momento ŝanĝiĝis mia posteno en la kolofono. Pro la fakto ke nun ekzistis kelkaj rubrikredaktoroj mi iĝis ĉefredaktoro.
Post la Bratislava kongreso, la unua postkongresa numero denove aperis en nova aspekto. Sennaciulo aperis kolora kun kvar koloraj paĝoj kiujn ni povis havi por la sama prezo, ŝanĝante denove presiston. Tia ĝi estas ĝis hodiaŭ.
Bedaŭrinde, malgraŭ ĉiuj tiuj ŝanĝoj kaj plibonigoj, ni ne sukcesas altiri novajn membrojn. Pluraj el niaj membroj opinias ke nia gazeto ne estas sufiĉe moderna kaj sufiĉe maldekstra por la junaj generacioj. Ni esperu ke la nova skipo sukcesos per nova Sennaciulo ŝanĝi tiun situacion.
Nun restas al mi danki al ĉiuj membroj de SAT kaj al ĉiuj legantoj de Sennaciulo pro bona kunlaboro dum tiuj 24 jaroj. Bonvolu nepre daŭrigi sendon de viaj kunlaboraĵoj al la nova skipo ĉar ili daŭre bezonos materialon. Ja, la veraj redaktoroj estas vi mem.
Mi deziras al ĉiuj grandan sukceson. Antaŭen por la bono de SAT kaj Laborista E-Movado.

Via ĝis-nuna redaktoro, Kreŝo

Asocia sidejo de S.A.T., administrejo kaj redaktejo: 67, avenue Gambetta, FR-75020 Paris, tel. +33.1.47.97.87.05, telekopiilo: +33.1.47.97.71.90.
Retadreso: satesperanto@free.fr.
TTT-paĝoj: http://satesperanto.free.fr
Oficejo malfermita: lunde de 9h30-15h30; de mardo ĝis vendredo: 9h30-16h30. Ekster la laborhoroj funkcias aŭtomata registrilo.
Poŝtkonto: SAT n° 1234-22 K, Paris.
IBAN: FR 77 30041 00001 0123422K020 39
BIC: PSSTFRPPPAR
Konto de SAT ĉe UEA : **satx-s**
Redaktas: Redakta Komitato - P. Lévy, G. Rollin, Viola, C. Orsingher, Snajpero, I. Moĉilnik kaj K. Barkoviĉ.
Ĉefredaktoro : Kreŝimir Barkoviĉ
Ekspedejo de Sennaciulo: adreso de la redaktejo.
Pri la enhavo de la artikoloj respondecas la aŭtoroj mem. Ricevitajn manuskriptojn oni ne resendas. La limdato de ricevo de manuskriptoj estas la 10-a de kuranta monato.
❐
Imprimé par : TROISA, 4 rue Théodule Ribot, FR-75017 Paris.
Aperas monate - Mensuel.
Le directeur de la Publication: Jacques BANNIER
Abonnement annuel/jara abono France 55 €.
Autres pays/aliaj landoj : peti la tarifon de nia peranto aŭ de la SAT-Centro.
Dépot légal à la date de parution.
N° CPPAP 0510 G 86567
Limdato por ricevo de kontribuaĵoj estas ĉiam la 10-a en la monato.